



*Estrara Komunikado EKO 2017-20 sendita el Seulo, Koreio, la 25an de julio.*

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alprokuro kun indiko de fonto: EKO de UEA

## La tag' al taga bunto

Pluras plurfacete la mozaika programo de la 102a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo. Tiom abundas la propono, ke kongresano devas zorge elekti siajn erojn; same, la nuna raporto povas frandigi nur kelkajn erojn el la kongresa riĉmikso.

**Dimanĉe**, post la inaŭgura ceremonio, la tagon kronis la nacia vespero, kun simfonia orkestro, solkantistoj kaj danc-spektakloj modernaj (*K-rock*) kaj tradiciaj. La efiko tamen malfacile transdoniĝis al multo el la publiko pro la tro granda kaj ne tiom konvena salonego.



Ĉiuj fotoj:  
SMG

**Lunde** permesis al kongresanoj kleriĝi en populara serio de atelieroj kaj prelegetoj. Unu el tiuj temis pri la nova furoraĵo, la komputila aplikaĵo *Amikumu*, kiu komence de la kongreso atingis sian kvinmilan aliĝinton. La populareco de tiu temo estis pruvita per superplena salono de aŭskultantoj. Okazis du studgrupoj de la Komitato de UEA, unu pri ideoj por nova kotiza strukturo, la alia pri la spezkontoj kaj buĝetoj de la Asocio.



Richard Delamore demonstros verve la eblecojn de *Amikumu* al plena salono da interesatoj, el kiu signifa proporcio jam uzas la apon.



**Marde** kiel ĉiam estas la tago de Kapablago, en kiu la Tago de Lernado de ILEI ludas gravan rolon. Meze de tiu tago la triopo de Mark Fettes (prezidanto de UEA), Mirejo Grosjean (prezidanto de ILEI) kaj Stefan MacGill (vicprezidanto de UEA) en mallonga konkluda sesio fermis solene la Jarcon de la Lernanto, kiun tiu sama triopo simile solene malfermis antaŭ unu jaro en la UK en Nitro. Okazis samtage kunsido pri la Afrika Agado, kiu simile altiris salonplenecon da partoprenantoj, el kiuj bedaŭrinde nur unu el Afriko. Kunordigis tion la estrarano de UEA respondeca pri Afriko, Lee Jungkee.

**Probal Daŝgupta en la Tago de Lernado**





S-ro Alphonse Waseka Kamango el DR Kongo klarigas al la publiko la admirindajn laborojn en Goma kaj la orienta regiono de tiu vasta afrika lando, kiuj rilatas ne nur al Esperanto, sed ankaŭ al edukado kaj evoluigo..



Ĉiu ĉeestanta estrarano de UEA partoprenis en la kunsido de la Afrika agado. Ne mankas ILEI. Signo de novaj prioritatoj.

Vortoj: 270

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.